# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Majo : 2 2022


## ĈU LA USONA SUPERA KORTUMO BALDAŬ LIMIGOS LA RAJTON ABORTI ?

La usona ĵurnalo *POLITICO* publikigis, antaŭ kelkaj tagoj, malneton de verdikto aprobota de la Usona Supera Kortumo rilate la rajton aborti. Laŭ tiu teksto la konservativa plimulto el la tribunalo opinias, ke oni devas rifuzi la enhavon de la juĝo decidita de tiu sama tribunalo en la kazo *Roe kontraŭ Wade* en la jaro 1973.



Juĝistaro de la Usona Supera Kortumo

Tiu jura proceso estis limŝtona decido de la Supera Kortumo de Usono, laŭ ĝi oni permesis induktitan aborton surbaze de privateco de la virino. Tiam multaj malpermesoj kaj restriktoj ekzistantaj en kelkaj ŝtatoj fariĝis nelaŭleĝaj kaj do, oni devis permesi abortojn.

Laŭ la publikigita malneto, la plejmulto el la juĝistoj de la Usona Supera Kortumo konsideras, ke tiu juĝo de la jaro 1973 profunde eraris, ties juraj fundamentoj estis tre malfortaj kaj tio provokis nur damaĝajn konsekvencojn. Kompreneble, temas nur pri malneto diskonigita de ĵurnalo, ne de oficiala verdikto. Tiun juĝon oni diskonigos fine de la monato julio aŭ en la komenco de julio, tamen ĉiuj asertas, ke la enhavo de tiu verdikto estos tre simila al jam aperinta malneto.

Nuntempe estas membroj de la Supera Kortumo ses konservativaj juĝistoj kontraŭ tri progresemaj. Laŭ tiu malneto, la usona konstitucio ne pritraktas la aferon pri aborto, do, oni ne povas aserti, ke temas pri konstitucia rajto. Tiel, devos esti la reprezentantoj de la civitanoj, tiuj kiuj devos decidi pri la leĝeco aŭ kontraŭleĝeco de la aborto. Ankaŭ pri eblaj restriktoj al tiu medicina ago.

# LA SUPERA KORTUMO DE USONO

La Supera Kortumo estas la plej alta jur-instanco en Usono. Ĝi konsistas el ĉefjuĝisto kaj ok asociitaj juĝistoj, kiujn nomumas la prezidento de Usono kun la konsento de la plejmulto de la Senato. Juĝistoj de la Supera Kortumo servas dumvive. Ili povas esti eksigitaj nur de la Kongreso pere de elposteniga proceso, kvankam tio neniam okazis ekde la fondiĝo de la Kortumo en la jaro 1789. Juĝistoj rajtas rezigni sian postenon, ĉi tio okazis kelkfoje.

La Superan Kortumon oni povas kompari al konstituciaj tribunaloj en aliaj ŝtatoj, do, ĝi kontrolas, ĉu leĝoj kaj verdiktoj kongruas al konstitucio. Same, ĉi tiu kortumo havas la lastan juĝistan aŭtoritaton por interpreti kaj decidi aferojn pri federacia juro.

La verdiktoj de la Supera Kortumo fariĝas deviga jurisprudencio, akceptata kaj sekvata de la ceteraj kortumoj, tribunaloj kaj juĝistoj. Same, la verdiktoj de la Supera Kortumo kapablas aboli leĝojn.

Tiuj du plej gravaj kazoj juĝitaj de la Supera Kortumo tra ties historio estis *Brown kontraŭ la Edukada Konsilantaro* de la jaro 1954. En ties verdikto la Supera Kortumo decidis, ke ras-apartigo en kiu ajn publika loko estas akto kontraŭ la konstitucio. Alia grava kazo estis *Roe kontraŭ Wade*, de la jaro 1973, laŭ kiu virinoj rajtas aborti pro la fakto, ke la konstitucio protektas la virinojn kaj iliajn personajn decidojn. Tamen, laŭdire, la nunaj juĝistoj de la Supera Kortumo, aŭ almenaŭ la plejmulto el ili, deziras nuligi tiun verdikton de la jaro 1973. En tiu jaro la juĝo ne estis unuanima, sep juĝistoj voĉdonis favore la agnoskon de la rajto aborti kaj la du ceteraj kontraŭe.



# *Vorto de la Semajno*

**Aresti** (tr): Per leĝa aŭ polica aŭtoritato kapti iun, por tiun malliberigi kaj eventuale transdoni al juĝado.

**Aresto:** Ago de tiu, kiu arestas.

**Arestito:** Tiu kaptita de leĝa aŭ polica aŭtoritato

**Arestejo:** Ejo, kie arestitoj estas provizore tenataj, antaŭ ilia apero antaŭ enketisto aŭ tribunalo.

Sinonimoj**:** *Reteni, kapti.*

*Policano arestis ebriulon kiu stiris aŭtomobilon plenrapide.*

*Revoluciuloj eniris en la policejon, tie ili liberigis ĉiujn arestitojn.*

